

# LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I \* N-RO 17

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

JUNIO 1933

## Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

Materialon por ĉi tiu rubriko oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Str. 94, Köln, Germ.; ĉiun ceteran materialon destinitan por „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

### Gramatikaj demandoj.

#### 55. Adjektivo aŭ participo.

En Heroldo n-ro 707 en „Kara senhontulino“ de Boatman mi legis: „Jam ŝi estas malfrua“. Mi komprenas, ke la aŭtoro volas diri: „Jam ŝi estas malfruanta“. Ĉu ĉi estas primo estas korekta? (M.M.)

#### 56. Adverbo.

Ĉu estas korektaj la jenaj esprimoj?:

1. Supraĵe pensantoj (ĉu ne supraĵaj?).
2. Kun tiaj sentimentoj mi trovis min preĝanta ke la fina, tragedia sceno fariĝu fatala (ĉu ne fatale?) por la virino. — „Anstataŭa edzino“, p. 67.
3. Ŝi travivis plejeble multon (ĉu multe?). — „Anstataŭa edzino“, p. 71. (X.)

#### 57. Nenia.

En „Fund. Krest.“ (raporto de s-ro Unuel. V) mi du fojojn trovas strangan uzon de „nenia“: „deklinacioj tute estas bezonaj **neniaj**“ (= tute neniaj deklinacioj estas bezonataj? = deklinacioj tute nenel estas bezonataj?) kaj: „laĵ motivoj ekzistas absolute **neniaj**!“ (= laĵ motivoj absolute ne ekzistas, absolute ekzistas neniaj?) = motivoj absolute ekzistas neniaj?). (F. J. B.)

#### 58. Refleksivo.

Kiel uzi ĝin, ĉu ĉiutlame ĉu laŭ kelkaj novaj lingvoj: „mi — min, ci — cin, li — sin“, ĉu: „mi — sin, ci — sin, li — sin“, se sama substantivo estas en propozicio subjekto kaj komplemento? (A. Z.)

#### 59. Tempoformo.

„Okazis tumulto, dum kiu du personoj estis mortigataj.“ (Heroldo n-ro 17, jaro 1932, p. 5, kol. 2, lin. 20.)

La formoj de kunmetita konjugacio pli-precizigas esprimon, indikante temporan rilaton al dua verbesprimo en la propozicio, aŭ finitecon aŭ nefinitecon de la ago, kiun slavidaĵ lingvoj precize esprimadas. „Estas mordata“ signifas nefinitan agon; „estas mordita“ ankaŭ preterito sed ĉiutlame „perfectum“ = finita ago. Ĉu estas vere? (A. Z.)

#### 60. Kazo.

Mi trovis frazon: „Kliŝon, se taŭga, ni volonte aperigos.“ Ĉu ne devas esti „taŭgan“? (M.M.)

### Respondoj.

#### 54. ĵus (kaj -iĝ-).

Por la verbformoj de ĉiuj tempoj (do ankaŭ por la as-formoj) ni havas la esprimon „koincide“. Ekzemplo:

Li estas tre avara pri sia tempo. Tamen li neniam venas tro malfrue al vagonaro, sed kelkfoje nur koincide kun ĝia eknoviĝo = koincide, kiam ĝi ekmoviĝas.

Figura uzo de „koincide“:

Li plej volonte trinkas vinon, sed koincide vinon (germane: gerade Wein) li devas eviti pro sia malsano.

Cetere la kombino de „ek“ kaj „iĝ“ en unu vorto (ekmoviĝi) devas esti permesata almenaŭ tiukaze, se „iĝ“ estas Zamenhofismo por la signifo de pasiva participo. Tiu Zamenhofismo estas praktika, ĉar ĝi liberigas de la demando, ĉu oni diru „at“ aŭ „at + it“. Ekz.: se mi movas maŝinon dum unu minuto, ĝi estas en la unua momento movata, sed de la dua momento krome movita. Oni do plene dirus: la maŝino estas movata kaj movita (movatas kaj moviĝas). Zamenhof simple diras: la maŝino moviĝas. Tiu ĉiura transiro de „ateco“ al „iteco“ havas komencon, esprimeblan per „ek“. (Sch.)

Rim. de red.: La artikolo de s-ro Sch. ŝajnas al mi ne vere esti respondo al la demando de s-ro B. K. La esprimon „koincide“ (adverba formo) ni neniam ralkonitis ĝis nun, la esperantistoj preferas „samtempe“ (sam-momento) aŭ, en figura uzo, „ĝuste“. — „Jus“ ĝenerale signifas, ke io okazis antaŭ momento: „li ĵus foriris“, „oni ĵus donis la medikamenton al la malsanulo“; sed kelkfoje oni povas permesi ĝian uzadon apud as-formo: „li ĵus estas en la apuda ĉambro“ (senco: li ĵus foriris por momento en la apudan ĉambron), pli korekte oni eble dirus: „li momente (nunmomente, nun, ĝuste nun) estas en la apuda ĉambro“. En la frazo citita de B. K. ŝajnas, ke oni povas uzi „ĵus“ kaj „ĝuste“: „ĵus“ tiukaze pli akcentus la tempon, dum ke „ĝuste“ signifus „akurate, precize, ekzakte, . . . ĝuste“ en figura senco; nefigurante sencon „ĝuste“ havus, se ĝi starus antaŭ „donis“: oni ĝuste (ĝustamantere, laŭ la recepto) donis la medikamenton. — Pri „iĝ“ ni konsentas kun s-ro Sch.

#### 55. Adjektivo aŭ participo.

„Frua — malfrua“ aplikiga al tempo, personoj, objektoj ktp.: frua horo, malfrua gasto, frua mango. Do, laŭ nia opinio, en la citita frazo estus korektaj la jenaj formoj: ŝi estas (tro) malfrua; ŝi estas (tro)

malfruanta; ŝi (tro) malfruas; ŝi venas (tro) malfrue. Eventuale ankaŭ: ŝi malfruigas.

#### 56. Adverbo.

1. Ni ne vidas eraron en tio, meti adverbeton apud substantivon. Do: bele skribanto, multe parolantaj; sekve ankaŭ: supraĵe pensantoj. Bele skribanto ne ĉiam estas bela, multe parolantaj ne ĉiam estas multaj sed eventuale povas esti nur du. Kiun ŝakas tia formo, tiu metu streketon inter adverbeto kaj substantivo: bele-skribanto, supraĵe-pensantoj, aŭ kunigu ambaŭ vortojn forlasante la adverbetan finaĵon: belskribanto, multparolantoj.

2. Devas esti fakte (adverbo). Cetere, en la romano troviĝas tiu korekta formo; ŝajne vi mislegis?

3. Ambaŭ formoj povas esti korektaj. Kiu estas preferinda, tio dependas de la senco celata de la aŭtoro. (Vidu ankaŭ en „Lingvaj Respondoj“ de D-ro Zamenhof, n-ro 65!)

#### 57. Nenia.

La cititaj formoj estas strangaj, precipe la dua; sed oni ne povas diri, ke ili estas nekorektaj, tiom pli, ĉar D-ro Zamenhof (= Unuel) mem ilin skribis.

#### 58. Refleksivo.

La esperantistaro ĝenerale aplikas la refleksivan pronomon nur ĉe la tria persono; nur malmultaj (precipe rusoj) uzas ĝin ankaŭ ĉe la unua kaj dua personoj. Do, estas konsilinde uzi ĝin nur ĉe la tria persono, sekve: mi — min (ni — nin), vi — vin, li (ŝi, ĝi, ili, oni) — sin.

#### 59. Tempoformo.

Pri tio „L. Kr.“ aperigis jam tutan vicon da artikoloj. (Vidu ankaŭ en la hodiaŭa numero ĉiun de K. Kalocsay!) Laŭ nia opinio, la piedantoj por la ita-formoj (en kazoj kiel tiu citita de s-ro A. Z.) estas malprava, ĉar mankas al ĉiuj klarigoj la nekuebla logiko. Sekve la citita frazo estas korekta: „Okazis tumulto, dum kiu du personoj estis mortigataj.“ Dum (= samtempo) la tumulto ili fakte estis mortigataj (= nefinita ago); post la tumulto ili estis mortigitaj (= finita ago, antaŭtempo). Korekta estus ankaŭ la formo: „Okazis tumulto, dum kiu du personoj iĝis (estigis, fariĝis) mortigitaj.“ Tiukaze la samtempo (nefinita ago) esprimiĝas per „iĝis (estigis, fariĝis)“, kaj „mortigitaj“ validas kiel kvalito, do kiel adjektivo (komparu: dum la tumulto kelkaj personoj fariĝis laca, rabiaj, teruraj, senvivaj, . . . mortigitaj).

#### 60. Kazo.

La citita frazo estas korekta; oni povas kompletigi: „Kliŝon, se (ĝi estos) taŭga, ni volonte aperigos.“ Sen „se“ devus stari akuzativo: „Kliŝon taŭgan ni volonte aperigos.“

# La Zamenhofa tabelo.

De J. Penndorf, Plauen.

Zamenhof ŝiam havis grandan modestecon aŭtoran. Li ne volis esti kreinto de la lingvo universala, sed nur la iniciatinto. Li ne espensis la vortojn kaj formojn, sed nur elektis la taŭgajn elementojn el la naĉaj lingvoj. Do nur mallongajn detalojn li arbitre fiksis. Tre interesa estas lia konstruado de la tiel nomitaj 'tabelaj-vortoj', t. e. korelataj pronomoj kaj adverboj.

Nia esploro eliras de § 30 de la „Fundamenta ekzerco“; ĝi tekstas jene:

..I. Ia, iah, iam, ie, ieh, ies, io, iom, iu.  
(La montritajn naŭ vortojn ni konsidas bone eternaj; ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan servon da aliaj pronomoj kaj adverboj.)

II. Se ni aldonas al ili la literon „k“, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiŭ.

III. Se ni aldonas la literon „t“, ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu.

IV. Aldonante la literon „ĉ“, ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu.

V. Aldonante la prefikson „nen-“, ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu.

VI. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi“, ni ricevas monitron pli proksiman; ekzemple: ĉiu (pli malproksima), tiu ĉi aŭ ĉi tiu (pli proksima); tie (malproksima), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksima).

VII. Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn“, ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiŭ ajn.

VIII. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finigoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tielulo, tiomulo ktp.“

Sajne estas kvazaŭ matematika skemo, vere sistemo arta sed logika, unueca, konstruita laŭ certa plano, kompleta, bazanta sur pli-malpli perfektaj fundamentoj de antikvaj kaj modernaj lingvoj. Ekzemple mi citas

el la greka: tosoi(de), hosos, posos, hoposos; tote, hote, pote, hopote;

el la latina: is, qui, quis; tantus, quantus; tot, quot; cum, tum; ubi, ubi;

el la itala: questo, quello, quale; chi, che; el la franca: qui, qu, quai; tel, quel, quelque;

el la angla: when, then; where, there; el la germana: wer, der; wo, da; dann, wann;

el la pola: coś, co, to; wtedy, kiedy, nigdy.

Laŭ la Zamenhofa tabelo rezultas kvin grupoj: nedifinaj, demandaj aŭ rilataj (ambaŭ parencaj aŭ identaj ankaŭ en la naturaj lingvoj); montraj, komunaj, neaj radikoj kum po naŭ finajoj, do entute 45 vortformoj.

La nedifinaj vortoj karakterizas la nura vokalo i (versajne devena de la germana „ingend“); la demandajn la litero k kun tiu sama i (analogie al itala „chi“ kaj franca „qui“, ambaŭ elparolataj „ki“, ankaŭ al pola-rusa „to, tak, tam“), la generalajn la litero ĉ morigante pri franca „tel“, angla „that“, pola-rusa „to, tak, tam“, la generalajn la litero ĉ kun i (eble pro la franca „chaque, chacun“), la neajn la prefikso „nen“ kum i. Mirigas nin lastokaze tuta silabo anstataŭ unuopa konsonanto.

Laŭ la modelo de la latinaj esprimoj „nunquam, nunquam, usquam, nusquam“ kaj la germanaj „irgendwo: nirgends, jemale: niemals“ — oni povas supozi, ke por la neaj formoj sufiĉas antaŭmetita litero n. Sed tuj evidentiĝas, ke ekz. el n+ia rezultas „nia“, tute absenca. Kaj se oni anstataŭigas la vorteton „ne“, tro amasiĝas la vokaloj; n+ia, n+io, n+iu. Do ŝajne pro belsonco Zamenhof preferis la silabon „nen“ kun duobla n. (Daŭrigota.)

## Pri la pasivaj participoj.

Ĉi tiun problemon plurfoje kaj larĝe oni pritraktis en L.Kr.; sed, kiel mi vidas, ĝi tute ne estas ankoraŭ solvita por ĉies konsento: ŝajne ĉiu pritraktinto rezervis sian antaŭan opinion. Tial, kvankam la afero eble jam estas teta al la legantoj, mi riskas repreni la temon; eble mi povos kontribui al la klarigo de l' demando. Precipe, ĉar s-ro Jung rekte alvokis orientanojn por tio, kaj mia gepatra lingvo ja estas kvazaŭ orienta; krome en ĝi, almenaŭ en la ordinara lingvo, tute mankas la pasiva formo — do mi ne estas antaŭokupita per miaj patrolingvaj parolkutimoj.

S-ro Jung aplikas por la solvo sistemon, kiu certe estas tre simpla, sed — ne konformas al la Zamenhofa lingvo-uzo. Krome, ĝi kontraŭas la lingvan senton de multaj esperantistoj diverslandaj. Tio estas grava malhelpaĵo, ĉar ĉiamaniere ili, vole aŭ nevole, persistos pri la sistemo kondamnita de s-ro Jung; kaj inter tiaj cirkonstancoj, por ekstermi ĉi tiun kutimon, oni devus ĝin oficiale deklari gramatika eraro. Sed, aliflanke,

estas malfacile deklari gramatika eraro ion, kion Zamenhof uzis tute sisteme.

Poste, la sistemo de s-ro Jung ne estas ĉiam aplikebla. Li diras, ke ita signifas ĉiam antaŭtempecon rilate al alia ago. Sed jen frazo: „La suno estis fervore kolektita, tamen nur post du jaroj ĝi estis kolektita.“ Evidente, ĉi tie la kolektado estas antaŭtempa al sia kompleta plenumo, do ita signas antaŭtempecon rilate al ita.

La sistemo starigita de s-ro Waringhien estas tute konforma al la Zamenhofa lingvo-uzo kaj la distingo, kiun li faras inter verboj de daŭro, verboj de rezulto, verboj de rezulto kaj rezulto, estas sendube vera, nekontestebla, tre utila kaj instrua. La sola riproĉo, kiun oni povas fari al ĉi tiu perfekta sistemo, estas, ke ĝi estas iom komplikita por homo ne sufiĉe sperta pri gramatiko, ĉar ĝi laboras kun multaj verboformoj (aoristo, preterito ktp.).

La tasko estas: trovi solvon, kiu estas simpla, facila, kaj krome tiel evidenta, ke

ĝin neniu povu malkonsenti. Ni rigardu, ĉu tia solvo estas trovebla.

\*

Ni ekiru el konstato, pri kiu, mi kredas, ĉiu konsentos:

Ata signas agon daŭran, nefinitan.  
Ita signas agon finitan, ne plu daŭrantan.

Do: ĉar ata signifas agon ankoraŭ daŭrantan, ĝi signifas ankaŭ agon ankoraŭ ne finitan, ne kompletan, ne tute finitan.

Aliflanke: ĉar ita signifas agon komplete faritan, ĝi signifas ankaŭ agon ne plu daŭrantan.

Ekzemplo:

Letero skribata: letero, kiun oni ankoraŭ skribas, ne finis.

Letero skribita: letero, kiun oni ne plu skribas, ĉar oni ĝin jam finis.

Nun, ni rigardu aparte la tri verbogrupojn distingitajn de s-ro Waringhien:

1. Ĉe verboj, kiuj havas daŭron kaj rezulton, ata signifas daŭron, ita signifas pretecon de ago.

Domo konstruata: domo, kiun oni konstruadas.

Domo konstruita: domo, kiun oni konstruis preta.

2. Ĉe verboj, kiuj havas nur daŭron, sed ne havas postan rezulton, ata signifas, ke la ago ĝuste okazas; ita signifas, ke ĝi jam ĉesis.

Mono havata: mono, kiun oni havas.

Mono havita: mono, kiun oni havis, sed jam ne havas.

3. Ĉe verboj, kiuj havas rezulton, sed havas nur momentan daŭron, ita signifas, ke la ago foje okazis, kaj estigis certan staton; ata signifas, ke la agon oni ripetas (ĉar ago momenta povas daŭri nur per ripetado).

Mono perdita: mono, kiun oni perdis, kiun mankas.

Mono perdata: mono, kiun oni perdadas (iom post iom).

Mi kredas, ke ĉio ĉi ĝis nun estas tute evidenta al ĉiu.

Nun ni rigardu, kiel statas la afero, se la participoj estas ligitaj kun esti.

1. Ĉe verboj de daŭro kaj rezulto ata aŭ ita signas, ĉu temas pri daŭra ago, aŭ pri la preteco de l' ago; estas, estis kaj estos signas, ĉu tiu daŭro aŭ preteco estas nuntempa, pasinta aŭ futura.

La domo estas konstruata: okazas konstruado (nun).

La domo estis konstruata: okazis konstruado (hierau).

La domo estos konstruata: okazos konstruado (morgau).

La domo estas konstruita: la domo estas preta (nun).

La domo estis konstruita: la domo estis preta (hierau).

La domo estos konstruita: la domo estos preta (morgau).

2. Ĉe verboj kun daŭro sen rezulto, ĝuste ĉar temas ĉiam nur pri daŭro, estas uzata ĉiam nur ata. La helpverbo signas, ĉu tiu daŭro estas nuntempa, aŭ jam ĉesis, aŭ nur sekvos.

Li estas konata: oni konas lin.

Li estis konata: oni konis lin.

Li estos konata: oni konos lin.

Kiel ni vidas, konita estas samsenca kun estis konata.

(Oni povus uzi eble ankaŭ „estis ita, por signi antaŭtempecon, ekzemple: „Mi estis konita, sed tiam oni jam ne konis lin“. Sed fakte, oni apenaŭ uzas tiajn formojn. Kaj prave, ĉar estas multe pli klare: „Mi antaŭe estis konata, sed tiam oni jam ne konis lin.“)

3. Ĉe verboj, kiuj signas momentan agon, la helpverbo signas, ĉu la stato estigita de la momenta ago, aŭ la ripetado de la ago estas nuntempa, pasinta aŭ futura.

La ŝlosilo estas perdita: la ŝlosilo estas en la stato de perditeco.

La ŝlosilo estis perdita: la ŝlosilo estis (hieraaŭ) en la stato de perditeco.

La ŝlosilo estos perdita: la ŝlosilo estos (morgaŭ) en la stato de perditeco.

La mono estas perdita: oni perdadas la monon.

La mono estis perdita: oni perdadis la monon.

La mono estos perdita: oni perdados la monon.

(Tio, ke ĉe la momentaj verboj oni signas la staton post la ago, kaj ne la agon mem, estas tute ne mallogika, ĉar ĉe tiuj agoj oni sciigas pri la ago nur tiam, kiam ĝi jam okazis. Nur tre malofte oni bezonas akcenti mem la agon, ekzemple: „la ŝlosilo cente estis perdita en la momento, kiam mi eliris mian poŝtukon.“)

~\*

Kiel ni vidas, en ĉi tiu sistemo la paraleleco de la tri tempo-formoj estas perfekta Male, en la sistemo de s-ro Jung tia paraleleco ne ĉiam ekzistas, ĉar oni ja devus diri:

La ŝlosilo estas perdita.

La ŝlosilo estis perdita.

La ŝlosilo estos perdita.

Kaj, nun estas kompreneble, kial la lingva sento de multaj esperantistoj kontraŭas la sistemon de s-ro Jung. Nome, en ĉi tiu sistemo oni akcentas daŭran agon, kiam oni vobe-nevole pensas pri stato post ago; krome, kiel rimarkis s-ro W. W. Padfield, oni lasas nin en dubo pri tio, ĉu ĉi ago estas finita, aŭ nur komenciata, sed ĉesigita sen komplota plenumo. (Ekz.: la fenestro estis malfermata — ĉu plene?) Sendube, same oni ne signas la finitecon dirante: „oni malfermis la fenestron“. Sed ĉi tie oni almenaŭ ne akcentas la daŭron (kiel per malfermata), do oni ne estas speciale atentigita pri la daŭrado, do ne finiteco de la ago.

Kaj — la supra sistemo, krom tio, ke ĝi tute konformas al la Zamenhofa lingvo-uzo, havas ankaŭ la avantaĝon, ke per ĝi, en okazo de neceso, oni povas certe fiksi, ĉu la ago estis komplete farita, aŭ ne. Tion signi ne ĉiam mi bezonas, sed plejofte ni uzas ja la aktivajn formojn, kie tia distingo eĉ ne estas ebla. Nu, se ni bezonas tion certe fiksi, ni povas uzi la formojn pasivan. Tiel, ni ne estas senbezone embarasataj de tro precize gramatika pensado, sed aliflanke tia precizeco tamen estas je nia dispono en okazo de neceso. Ankaŭ tie ĉi povas do plene validiĝi la principo de „neceso kaj sufiĉo“.

Nun eble kelkaj diros, ke la afero ankaŭ post tiaj klarigoj ŝajnas al ili diable komplikita. Pro tio mi volas malikaŝi simplan rimedon, per kiu, en okazo de dubo, oni tuj povas vidi, ĉu ata aŭ ita devas esti uzata.

Kiel supre mi diris, ata signas daŭron, do ĝi preskaŭ egalvaloras al la sufikso ad'. Do, por certigi, kiun formon uzi,

oni transformu la pasivan frazon en aktivan, kaj oni gluu al la verbo la sufikson „ad'“. Se per tio la senco ne aliĝas, oni

uzu „ata“. Se „ad'“ ne taŭgas tie, oni uzu „ita“.

Ekzemploj:

Volante diri, ke okazis konstruado de domo, oni provu:

„oni konstruadis la domon“ —

ĉi tiu frazo havas la saman senco, la pasiva frazo do estos:

„la domo estis konstruata“.

Volante diri, ke la letterskribo hieraaŭ estis preta, oni provu:

„oni skribadis la leteron hieraaŭ“

ĉi tiu frazo diras nur, ke okazis skribado, sed ne fiksas la pretecon de la ago. Ad' do aliĝas la senco, ne taŭgas. La pasiva frazo do estos:

„la letero estis skribita hieraaŭ“.

Volante diri, ke la ŝlosilo hieraaŭ estis en stato post perdiĝo, oni provu:

„oni perdadis la ŝlosilon hieraaŭ“ —

ĉi tie ad' evidente ne konvenas, la pasiva frazo do estu:

„la ŝlosilo estis perdita hieraaŭ“.

Kompreneble, se la verbo estas daŭro-verbo sen posita rezulto, oni povas spari ankaŭ ĉi tiun penon kaj uzi ĉiam ata.

Mi kredas, ke ĉi tiu sistemo estas sufiĉe simpla, bone komprenebla, facile uzebla, kaj en okazo de dubo, perfekte kontrolebla. Krome ĝi estas konforma al ĉies lingva sento, imitas nenian nacian lingvon kaj propre estas nur la fikso de Zamenhofa lingvo-uzo.

K. Kalocsay.

## Postrimarko.

Kvankam disponante ankoraŭ pri aro da artikoloj koncernantaj la „problemon“ ata—ita, la ĉefredaktoro de „Lingva Kritiko“ deziras fermi per ĉi-supra artikolo de nia estimata samideano-poeto la diskuton pri ĉi tiu temo en „Lingva Kritiko“. Eventuale, se la loko permesos, mi reprenos ĝin en „Heroldo de Esperanto“ mem. Holdiaŭ jam nur kelkajn rimarkojn pri la artikolo de s-ro Kalocsay:

S-ro Kalocsay diras ke en la frazo: „La sumo estis fervore kolektata, tamen nur post du jaroj ĝi estis kolektita“, ata estas antaŭtempa al ita. Vere. Sed mi ne diris ke „ita signifas ĉiam antaŭtempecon rilate al alia ago“ — sed mi diris ke „ita signifas antaŭtempecon (finitecon de la ago) rilate al la momento, pri kiu oni parolas (do ion, kio okazis pli frue ol en la momento, pri kiu oni parolas, — ion kio jam estis finita en la momento, pri kiu oni parolas“ (L. Kr. n-ro 5, junio 1932). En la supre citita frazo de s-ro K. ĉi tiu momento, pri kiu oni parolas, estas „post du jaroj“ — tiam la kolektado jam estis finita, la kolektado okazis pli frue ol en tiu momento („post du jaroj“), sekve „kolektita“ estas tute korekta, ankaŭ laŭ miaj klarigoj. Jen ankoraŭ kelkaj ekzemploj:

La katedralo de Kolonjo estis konstruata de 1248 ĝis 1880; ĝi estis ankoraŭ konstruata en la komenco de 1880, sed ĝi estis konstruita en la fino de 1880. — La 14-an de majo s-ro X estis akceptata de la angla reĝo (ni supozu, ke tio okazis je la 17-a horo); en la vespero de la sama tago li estis akceptita. — Dum la tumulto du personoj estis mortigitaj; post la tumulto ĉi tiuj du personoj jam estis mortigitaj.

S-ro K. diras, ke en lia sistemo „la paraleleco de la tri tempo-formoj estas perfekta“ kaj ke „male, en la sistemo de s-ro Jung tia paraleleco ne ĉiam ekzistas, ĉar oni ja devus diri: La ŝlosilo estas perdita;

la ŝlosilo estis perdita; la ŝlosilo estos perdita“. Tiu aserto de s-ro K. multe mirigas min; ĝi pravas, ke mia tre estimata hungara samideano ne bone legis miajn artikolojn en L. Kr. n-roj 5 kaj 11. Mi tie klare montris kaj en n-ro 11 formis la regulon ke, „se en prezenso (nuntempo) staras ata, ĝi devas ankaŭ stari ĉe la koresponda verbo-formo preterita (pasinta) aŭ futura (estonta); se en prezenso staras ita, ankaŭ en preterito kaj futuro staras ita“, kaj mi donis la jenan ekzemplon:

Ĝi estas vestata,  
Ĝi estis vestata,  
Ĝi estos vestata;

sed:

Ĝi estas vestita,  
Ĝi estis vestita,  
Ĝi estos vestita.

Same, se en la ekzemplo de s-ro K. la prezensa formo estas: La ŝlosilo estas perdita, la preterita formo estas: La ŝlosilo estis perdita, kaj la futura formo: La ŝlosilo estos perdita, „laŭ la sistemo“ de s-ro Jung! Sed se en prezenso oni ne diras: ita, oni ankaŭ ne povas (logike) uzi ita en preterito aŭ futuro. Ĉuste tie troviĝas la logika eraro de multaj samideanoj: ili uzas en preterito ita, kiam ili ĉe la koresponda formo en prezenso nepre uzas ata. Ili diras, ekz.: S-ro X eniris la salonon; tie li estis akceptita de la reĝo. Sed en prezenso ili nepre diras ata: S-ro X eniras la salonon; tie li estas akceptata de la reĝo.

S-ro K. diras ke „ata signas daŭron“ kaj ke „do ĝi preskaŭ egalvaloras al la sufikso ad'“. Ne, sinjoroj, ata signas daŭron (samtempecon) nur rilate al la momento, pri kiu oni parolas, sed ne absolutan daŭron: sekve ĝi ne „preskaŭ“ egalvaloras al ad' (kvankam kelkfoje ĝi povas havi tiun signifon); ata povas signifi eĉ tute etan momenton, ekz.: La domo estis fotografata en la sama momento, kiam la fotografisto premis la butonon. (Tute ne: oni fotografadis la domon.)

Fine, denove la tute simpla, tre klara kaj, antaŭ ĉio, logika regulo: Se en nuntempo staras ata, ĝi devas ankaŭ stari ĉe la koresponda verbo-formo pasinteca aŭ estonteca; se en nuntempo staras ita, ankaŭ en pasinteco kaj estonteco staras ita (laŭ la ekzemplo de s-ro K. mem pri la domo kiu estas, estis aŭ estos konstruata aŭ konstruita), aŭ, alie esprimite: Por trovi, ĉu en pasinteco oni devas uzi ata aŭ ita, oni provu, kiun partizan finajon (ata aŭ ita) oni devus uzi ĉe la sama verbo-formo en la nuntempo, kaj tiun saman formon oni uzu ankaŭ por la pasinteco.

T. J.

## Recenzoj kaj studoj

El la libroj aperintaj dum la pasinta jaro, sendube do okupas la unuan vicon laŭ graveco: la verko de E. Wüster, *Internationale Sprachnormung in der Technik*, kaj tiu de E. Drezen, *Historio de la Mondolingvo*, Leipzig, Ekredlo, 1931.

Pri la unua, Heroldo jam ofte parolis, publikigante ankaŭ eliraĵojn kaj studojn; kaj ĝi certe meritas grandan atenton, fundan studadon, kaj serparian diskutadon. Pri la dua oni mal multe parolis ĝis nun, kvankam ĝi neniel estas malpli grava por nia movado.

En „Antaŭparolo“ la aŭtoro klarigas, ke la verkado de la libro estis komencita antaŭ dudek jaroj kaj ke la nuna verko estas efek-

tive la sesa eldono de la unua verketo, sendese plivestigita kaj ikorektata dum la 20 jaroj.

Ĝis nun, la ĉefaj verkoj pri la historio de mondolingvo estis tiu de L. Couturat kaj L. Leau (*Histoire de la langue universelle*, Parizo, Hachette & Cie, 2-a eldono, 1903) kaj tiu de A. L. Guerard (*A short History of the international language movement*, Londono, Fisher Unwin, 1922).

Sed la unua, publikigita kiam Esperanto apenaŭ ekpaŝis en la okcidenta Eŭropo, tro detale analizas la diversajn provojn de lingvo internacia, kaj cetere estas elĉerpita; dum la dua atentis nur malmultajn plej modernajn provojn kaj fine malkaŝe esprimas sian simpatian por Latino sine flexione.

Ni trarigardu la verkon de s-ro Drezen iom detale. La historion antaŭiras du ĝeneralfaj ĉapitroj pri la rolo kaj evoluo de natura lingvo kaj pri ĝia reguligado. La aŭtoro prave akcentas la fakton, ke lingvo estas antaŭ ĉio socia fenomeno, kaj tial havas ĉiam en si ion konvencian; sed multaj lingvistikaj asertoj estas diskutindaj: ekz. ke la lingvoj de primitivaj homoj havas 250 ĝis 300 vortojn. Prave oni ankaŭ atentigas pri la artefariteco de la literaturaj lingvoj: apud la ekzemploj de la germana, hungara, sanskrita lingvoj kaj de „lingvo ĝeral brazilia“, oni povus aldoni multajn aliajn: tiun de la nova „handsmaal“, de la novgreka „katharevousa“, ktp.

La historio mem estas tre plena, ĉar la aŭtoro utiligis ne nur la grandajn verkojn sciencifitajn, sed ankaŭ malmovajn artikolojn de L. Einstein (1885), H. Moser (1888), O. Knuth (1888), L. Boflack (1899); tial ĝi mencias tre multajn aŭtorojn, kaj precipe multajn slavajn, kiujn eĉ Stojan ne konis. Tamen restas ankoraŭ multo por fari, ĉar eble multaj projektoj estas ankoraŭ nekonataj, kaj pri multaj oni konas preskaŭ nur la nomon de la aŭtoro. Por ke tia verko estu perfekte, necesas internacia kunlaborado: estas neeble al unu homo legi ĉiujn librojn, ankaŭ tial, ke ili ne estas al li alireblaj, es. ante konservataj en plej malsamaj bibliotekoj. Sed nur tiel oni evitus multajn erarojn.

Aliflanke, multajn sciigojn, kiuj sen serĉo kombrolo estas transprenitaj de la antaŭaj verkoj, oni devus forigi.

La abatinio Hildegardis ne verkis lingvon internacian, sed elpensis nur ian „internan“ lingvon, similan al tiu elpensita de la profetino de Prevorsit (fino de la 18-a jarcento) kaj al la egipta kaj marsa lingvoj elpensitaj de iuj mediumoj.

La „latino macaronico“ de Teofilo Folengo nek estas monda lingvo nek provo adapti la latinan lingvon al la bezonoj de la 16-a jarcento: ĝi estas nur miksaĵo de italaj, latinaj kaj dialektaj vortoj kun latinaj finaĵoj, kreita por burleska poezio. La cititaj versoj estas erarplenaj; la originala distiko estas:

„Vado per hunc boschum scilus chiamando  
[Zaninam,  
ut ohiamat vitulum vacca smarrita suum.“

Sed ni revenu al la eraraj informoj. Sur paĝo 69, oni renkontas mencian pri iu Magazini (laŭ Stojan: Magazini): laŭ la fono la nomo estas itala, sed ĉu ĝi ne estas eraro anstataŭ „Magazin für allgemeine Sprache“ 1815—1820? Tantaŭe kaj Tartaglia (paĝ. 32 kaj 33) estas la sama itala matematikisto; dum Ders eble estas nur „derselbe“ (la sama).

La projekto de M. Gigli havas ja apriorian gramatikon; sed la aŭtoro en rimarko sur paĝo 210 diras: „En la pravigita supozo, ke

la franca lingvo estas plej konata de la kleruloj, mi prenas el ĝi literojn kaj vortradikojn por mia universala lingvo“. La numerulojn, kiuj estas gramatikaj elementoj, li konstruis ankaŭ apriorie.

Estas eraro ankaŭ prezenti la elpensadon de A. Robida (1889) kiel „supozon pri la demando de estonta racia lingvo“; la „lingvosafato“ estas nur ŝerco. Sed rimarkinde estas, ke Robida en siaj aliaj fantaziaĵoj pli bone trafis la realcon nunan: li antaŭvidas verkurojn de direkteblaj balonoj, tiel malgrandaj, ke ili taŭgas nur por unu ensidanto; la aeron poligon, la hemian militon (unu el la protagonistoj estas oficiro en hemiista regimento), kaj eĉ la pertelefonan disaŭdigon de muziko kaj tagaj informoj.

Multaj el tiuj eraretoj estas ŝulditaj al la „Bibliografio de internacia lingvo“ de P. Stojan, verko nekontentiga precipe de la bibliografi-teknika vidpunkto. Multaj propraj nomoj estas erare skribitaj (Shott anst. Schott, Mopertuis anst. Mauvertuis, d'Alamber anst. d'Alembert), kio estas tre bedaŭrinda ĉe tia verko, kaj eble devenas de la rusa kulturo skribi la nomojn per la enlanda alfabeto pli-malpli laŭ la prononco.

Ankaŭ kritikinda estas la intermikso de opinioj de sciencistoj pri lingvo internacia kun la veraj projektoj, laŭ nur kronologia ordo.

La preseraroj svamas: preskaŭ sur ĉiu paĝo estas kvar, kvin da ili!

La plej interesaj kaj valoraj paĝoj estas tiuj pri la historio de Volapük, de Esperanto kaj de Ido. Ili estas tre instruaj, ĉar ili klare montras, ke la malvolvigado de lingvo povas dependi nek de unu homo, nek de pli malpli granda leĝdonanta institucio: tiuj ĉi du sistemoj kondulkis al pereco Volapük-on kaj Ido-n.

Nur Zamenhof komprenis ke, ĉar lingvo estas socia fakto, nur la socio konsistanta el ĝiaj uzantoj praktike decidis pri ĝia evoluo, tute same, kiel ĉe la naturaj lingvoj.

En la lastaj ĉapitroj la aŭtoro skizas la historion de la Esperanto-movado de 1907 ĝis 1930; sed li, kiel komunisto, atentis precipe la agadon de la klasbatalaj organizoj, kaj ĝi trotaksa alian rolon. Ankaŭ la fino de la libro estas verkita laŭ komunisma ideologio, kaj la aŭtoro tute senhezite asertas ke, kiam la tuta mondo alprenos la komunisman ekonomion, tiam ekostos lingvo internacia, „kreskonta el la kerno de la nuna Esperanto... certe diferenco de la nunforma Esperanto“, kiu „forpuŝos uzadon de la naciaj lingvoj ankaŭ en la internaciaj rilatoj“.

Nature, pri tiu ĉi lasta parto neŭtraloj kaj nekomunistoj ne konsentos.

Malgraŭ la eraretoj kaj la rezervoj elvokitaj de la politikaj vidpunktoj de la aŭtoro, la verko de samideano E. Drezen estas tre altaŭtorita, kaj ĉiam tre interesa, kaj ĝi meritas la plej grandan disvastigon.

Stefano La Colla, LK.

## LINGVA TRIBUNO

### Pra-Esperanto.

(Komento al la artikolo de J. Penndorf en „Lingva Kritiko“ 1/15 kaj 16.)

Pri la linio 9 de la poemo „Il A“ Penndorf sendube eraras. La vortoj „so palla a no“ evidente simple signifas: „ŝi palla al mi“ kaj la verbo „rediras“ estas subkomprenata, kiel ofte okazas en poemoj. Komparu Dante: „Ed egli a me, come persona accorta“ (kaj li al mi, kiel persono informita); la vorto „rispose“ (respondis) estas

klasita, ĉar subkomprenita. Do, „palla“ en tiu ĉi frazo estas simple adjektivo.

La 12-a linio tekstas kaj tradukaĝas jene:

„Kor tol fe prekalle amé mo“

(Ĉar vin tiel varmege amas mi).

Supozeble „fe“ signifas: tre, tiel, ĉiam aŭ plej. La vorto „prekalle“ estas adverbo el „prekala“. „Kalla“ estas varma. Pre (en pola lingvo preze) estas afikso por „tre“, la nuna sufikso „-eg-“.

La vorto „si“ eble korespondas al la nuna „ja“; sed pri tio mi ne estas certa.

Oscar Binemann, Hamburgo.

\*

### Teknikaj vortoj por gramatikaj konceptoj.

Por gramatikaj esprimoj oni uzas en naciaj lingvoj latinajn nomojn, sed ne simile en ĉiuj lingvoj. Tial ilia uzado en Esperanto estas iom konfuza. La vortaroj, kiuj nur tradukas, sed ne klarigas vortojn, ne helpas ĉi tie. Mi donas kelkajn ekzemplojn.

Laŭ mallingvaj gramatikoj (finnaj) „predikato estas verbo, kiu esprimas agon aŭ staton de subjekto“, kaj „atributo (akdonajo) estas vorto, kiu senpere (sen helpo de verbo) estas ligita al substantivo“. Laŭ Esperanto-vortaro de Boirac „predikato estas atributo de propozicio“ kaj „atributo estas vorto, kiun oni rilatigas al subjekto per la verbo esti“. Do la senco de la vortoj predikato kaj atributo ne estas sama en ĉiuj vortaroj kaj gramatikoj. Naciaj gramatikoj parolas pri „objekto“, sed en Esperanto oni uzas la vorton por alia senco. La gramatika „objekto“ verŝajne ne havas en Esperanto oficialan vorton, sed multaj nomas ĝin „rekta komplemento al verbo“. Mi ne scias ĉu teknika vortaro por gramatikaj esprimoj estas preparata, sed ĉiukaze estus bone, se iu kompetentulo farus en Heroldo aŭ en L. Kr. proponojn kaj klarigu ilin per ekzemplaj frazoj. H-s K.

\*

### Prepozicio „de“.

Laŭ mia lingvosento „peco je tiu tukko“ signifas, ke tukpeco, kiu estas simila al la montrita tukko, dum „peco de tiu tukko“ estas tuj komprenebla, kiel kunparteco, fine ja „de“ signifas devenon, posedon, do ankaŭ kunpartecon. Simile ĉe „vendisto de vino“ la esprimo estas komforta al la esprimo en multaj aliaj lingvoj (ekzemple en la hungara). La vino ja „havas“ vendiston, „posedas“ vendiston, do oni ne sentas ian malbonuzon ĉe tiaj vortoj: „komercisto de ŝtofo, redaktisto de gazeto, elparolo de certa vorto, prezentado de teatraĵo“. En tiuj okazoj mi sentas la posedon kaj uzas similan gramatikan formon en mia propra gepatra lingvo. Kial do tro precizigi kaj peziigi Esperanton, kiu ja tamen estu finfine nur interpopola „ŝlosilo“-lingvo por kompreni, sed ne estu rigida, se oni povas kompreni la sencnon? P. B., B.

### Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj similaj libroj prilingvaj, dezirantaj specialan kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“, estas petataj sendi po unu ekzemplero al la ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Ni atentigas speciale, ke temas ne pri recenzoj, sed pri serioza kritiko de libroj prilingvaj, do ne de verkoj beletristikaj k. sim.